



THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

Vol. XII.—No. 133.

JANUARY, 1916.

[Price 3d.]

GROUPS AND SOCIETIES AFFILIATED TO THE B.E.A.

*Order of Information.—Group; Secretary; Place of Meeting, Day, and Hour.
* Denotes New Group.*

ACCRINGTON.—Mrs. SIDEBOTTOM, 69, Aitken-st.—First Mon., 8, same address.

ADELAIDE (S. AUSTRALIA).—W. D. SMITH, G.P.O., Adelaide.—Mon.

BANBURY.—Mrs. BRAGGINS, 18, Calthorpe-rd.—At the house of Mrs. Gillett, "The Elms."—Tues. 8—9.

BARROW-IN-FURNESS.—W. BARRIE, 20, St. George's-ter.—"Carona Café," Wed., 7.30—9.30.

BATH.—E. R. BLACKETT, 15, Southgate-st.

BELFAST.—F. FARRINGTON, 7, Fitzwilliam-ave.

BEXHILL-ON-SEA.—C. W. HARRIS, 38, Sackville-rd.

BEXLEYHEATH (KENT).—J. R. BROWN, 76, Oaklands-rd. "Balbirnie," 40, Oaklands-rd., Tues., 7.45—8.45.

BIRMINGHAM.—ERIC BIDDLE, "Selborne," Western-rd., Wylde Green.—13, Queen's College, Paradise-st., every evening, 7—9; Sats., 4—7 (tea 5 p.m.); Classes, Tues., 7—9; Club Meetings, Thurs., 7.30—9.

BLACKBURN.—HARRY FLINT, 36, Clifton-st.—Friends' Meeting Ho. at King-st., Wed., 8.

BLACKPOOL.—Miss A. C. AMBLER, 31, Bela Grove.

BOGNOR.—G. NELSON TRAVIS, "Avilion," Highfield.—Queen's Hall, 1st and 3rd Thur., 8.

BOLTON.—JOHN R. HALL, 121, Holland-st., Astley Bridge.—Vegetarian Restaurant, Newport-st., 3rd Thur., 7.30.

BRADFORD.—L. HAENSLER, 27, Binnie-st.—"Mikado Café," Godwin-st., Tues., 8.

SYKE.—Wright's Café, Commercial-st., Fri., 8.

BRIGHOUSE.—Miss A. ASPINALL, 4, Halifax-rd., Sleath.

BRIGHTON & HOVE.—Miss EKLUND, 9, West-d've, Queen's park.—School of Elocution, 10, Old Steine, Tues., 7.

BRISTOL.—W. F. WESTMANCOTE, 142, Chessel-st., Ashton Gate.—115, Sandy Park-rd., Brislington, Sun., 10.30 a.m.

BUCKHURST HILL (ESSEX).—Miss N. A. STACEY, "Woodthorpe."—"Woodthorpe," 2nd and 4th Weds.

BURY.—Miss L. BURTON, 14, Hurst-st.—Co-operative Hall, Market-st., Wed., 7.30.

BUXTON.—Mrs. Langley, "Brancepeth," Market-st.—Meeting Place: Write Sec.

CAMBRIDGE UNIVERSITY.—L. FIRMAN-EDWARDS (Trin.).—In Member's Rooms, Friday, 8.30.

CAMBRIDGE (VERDA STELO).—Miss BARBARA SMITH, 38, Norwich-st.

CANNOCK.—Miss M. A. WALKER, Walhouse.—Parish Room, Tues., 7.

CAPE TOWN.—Miss E. CASH, 62, Sir Lowry-rd.

CHELTENHAM.—W. G. PHIPPS, "Marston," Langdon-rd.—"Orme Chambers," North-st., Tues., 7.30.

CHESTER.—J. W. DOBSON, 27, Brook-st.—People's Hall, Delaware-st., Mon., 8.

COVENTRY.—Miss C. O. TAYLOR, "Espero," Stanway-rd., Earlsdon.—Same address, Mon.

DARWEN (LANCS).—B. A. WALSH, 16, Oxford-st. (pro tem.).—Technical School, Tues., 7.30.

DEAL.—HERBERT SEWELL, College-rd. Post Office.

DERBY.—J. POTTER, Jun., 4, The Strand.

DONCASTER.—W. R. JENNINGS, 40, Cartwright-st.—55B, Hallgate, Tues. and Thur.

DOVER.—W. CHITTY, Mildura, Park-ave.

DUBLIN MODERN LANGUAGES SOC. (ESP. SEC.)—CHARLES P. BLACKHAM, 14, Garville-ave., Rathgar, co. Dublin.—Lincoln Chambers, Lincoln-place, Thur., 8.

DUNDEE.—ALFRED A. SLIDDEES, 10, Whitehall-st.

DUNSTABLE.—J. COLLETT, 13, Victoria-st.—Willow Café, 1, Church-st., Wed., 7.30—9.30.

EASTBOURNE.—JOHN P. NIX, 2, Terminus-rd.—Grosvenor Restaurant, Terminus-rd., 1st and 3rd Mon., 8; other Mondays, 5, for Tea.

* ECCLES (Lancs).—Miss HOOG, 11, Mather-rd., Carnegie Library, Wed., 7.30.

EDINBURGH.—JOHN DISHART, 24, Bruntsfield-gardens.—Wed., 6 p.m., in Patrick Thomson Tea Rooms, North Bridge; at 8, in 26, Synod Hall.

EXETER.—Miss A. SHAPLEY, Westwood, Spicer-rd.—University College, Queen-st., Tues., 7.30.

FREMANTLE (W. AUSTRALIA).—COLIN UNWIN, 48, Cliff-st.—Telephone 85.

GATESHEAD-ON-TYNE.—F. SUTCLIFFE, 65, Fern Dene-rd.—N.E.R. Institute, High Level End, Sat., 7.30.

GLASGOW.—F. COUPERTHWAITE, 81, Armadale-gardens, Dennistoun.—Stuart Cranston's Tea Rooms, Argyle Arcade, Mon., 5.30—7.

GLOUCESTER.—K. L. POWELL, 62, Conduit-street.—Technical Schools, Fri., 7.0.

GREENOCK.—Miss R. P. AITKEN, Brougham-st.—Musical Club Bldgs., 34, Union-st., Thur., 8.

HAILSHAM.—Miss ELLA MITCHELL, The Grove.—"Brocklesbury," North-st., Mon., 7.30.

HALIFAX.—Miss BARBARA SLADE, 366, Queen's-rd.—Mon., 7.30.

HALIFAX.—PERCY CLAYTON, 37, Abbey Walk.—Holder's Refreshment Rooms, King's Cross, Tues., 7.30.

HALSTEAD (ESSEX).—Miss ZOE INMAN, Colchester-rd.

HARROGATE.—Miss M. THORPE, 83, Dragon Parade.

HARROW.—BERNARD LONG, 46, Roxboro'-rd.

HASTINGS.—A. J. ADAMS, Plynlimmon-ter.—Semadenis Restaurant, 6, Claremont, 1st Tues and 3rd Fri., at 7.30.

HOBART (TASMANIA).—K. SIMMONS, 475, Macquarie-st.

HUDDERSFIELD.—W. H. HIRST, 45, Thornton Lodge-rd.—Technical College, Queen-st., S., Thur., 7.45.

HULL.—Miss G. WILLFORD, 102, Westbourne-ave.

KEIGHLEY.—FRANK C. RHODES, c/o Harrison & Clough, Park-st.—Mon.

KETTERING.—A. E. SMITH, Garfield-st.—Old Free Library-buildings, Silver-st., Mon., 7.45.

KIDWELLY.—E. R. GRIFFITHS, Emlyn House.—Parish Room.

KILMARNOCK.—PETER YOUNG, 42, Fullarton-st.—Y.M.C.A. Institute, Titchfield-st., Tues., 7.30—9.30.

LANCASTER.—Miss GRISENTHWAITE, 3, Newsham-rd.

LEEDS.—Miss L. BRIGGS, West Lea, Armley.—10, Park-st., Fri., 8.—(WEST) SOCIALIST ESPERANTISTS.—JOSEPH GOLDBLATT, 27, Lovell-rd., Leeds.—Socialist Inst., Sutherland-st., New Wortley, Thur., 8.

LEITH.—Miss E. WALLACE, 23, Starbank-rd., Trinity.

LEITCHWORTH.—F. A. GOODLiffe, Elm Tree House.—Esperanto Klubo, 21, Station-rd., Weekdays, 11 a.m.—1 p.m. Club night, Sat., 7—8.30.

LEITCHWORTH.—F. A. GOODLiffe, Elm Tree House.—Young People's Class.—Tues. 6—8. Thurs. 6.30—7.30. Class, Fri. 7.30—8.30. Club, 8.30—9.30. At Guild of Help Offices, Station-place.

LIVERPOOL (CENTRAL).—ERNEST BROWLOW, 4, Holmeleigh-cottages, Grassendale.—18, Colquitt-st., Room 3, Fri., 8.

LONDON (CENTRAL).—P. J. CAMERON, 69, Schubert-rd., Putney, S.W.—St. Bride's Inst., Ludgate-cir., Fri., 7.0.

BALHAM, S.W.—Miss H. PRICE, 50, Dinsmore-rd., Balham Hill, S.W.—Bank House, 1, Station-rd., Thur., 8.0.

BATTERSEA, S.W.—Mrs. L. A. EVANS, 8, Bolan-st.—Board Room, Latchmere Baths, Wed., 8.

BRIXTON, S.W.—E. W. EAGLE, 21, Kellett-rd.—52, Brixton-hill, Tues., 8.

CHARING CROSS, W.C.—B.E.A. Reading Room, Wed., 3 (Begin.); 3.30 (Adv.), Instr.—Ad. SHEFER.

CROYDON.—L. L. S. LOUIS, 1, Courtney-rd., Waddon.—Ruskin Ho., Station-rd., W. Croydon, Tues., 8.

EAST LONDON.—J. GOURLAY, 12, Dunbar-rd., Wood Green N.—Room A, Toynbee Hall, Wed. 8.

EAST SUBURBAN.—H. JOHNSTON, 145, Harold-rd., Upton Park, E.—607, Romford-rd., Forest Gate, Thur., 8.

EMMANUEL (S.E.).—W. H. BROWNE, 51, Kemshead-rd., Camberwell, S.E.—White Sec.

FINCHLEY.—F. BALDWIN, 54, Durham-rd., East Finchley.

GREENWICH.—R. D. J. SIMPSON, 53, Cranfield-rd., Brockley, S.E.—Halstow-rd. L.C.C. School, Thur., 7.30.

HAMMERSMITH & CHISWICK.—ALFRED BRIDGES, 181, Blythe-rd., Hammersmith.—Hampshire House Club, Hog-lane, King-st., Hammersmith, Thur., 8—10. Non-club members cordially invited.

KINGSTON-ON-THAMES.—J. E. HOOKHAM, 45, Holmesdale-rd., Hampton Wick.—Warwick Lodge, Hampton Wick, 2nd Mon., 8.30.

MILDHAM & Highbury.—M. C. BUTLER, 18, Leigh-rd., Highbury.—1, Alma-rd., Canonbury, N., Thur., 8.

POSTAL ESPERANTISTS, BRITISH LEAGUE OF.—G. E. ORE, Western District, Wimpole-st., W.

STEPNEY.—W. T. BURDEN, 13, Belgrave-st., E.—Stepney Meeting Hall, Garden-st., Wed., 8—10.

TUFNELL.—S. H. TAYLOR, 2, Arthur-rd., Holloway, N.—Lecture Hall, New Church, Parkhurst-rd., N. Tues., 7.45—10 p.m., Elem. and Adv. Classes.

WEST NORWOOD.—A. H. HUGHES, 34, Romola-rd., Herne-hill, S.E.

WOOD GREEN.—ROBERT ROBERTSON, 364, Alexandra Park-rd.—Public Library, Thur., 7.30.

WOOLWICH.—E. K. JAYNE, 22, Kinveachy-gardens, Old Charlton, S.E.

MAIDSTONE.—W. R. EDWARDS, 15, Earl-st.—Dockrill's Restaurant.

MANCHESTER.—J. S. LORD, 17, Alderley-rd., Flixton.

MELBOURNE (AUSTRALIA).—W. J. DRUMMOND, Box 731, G.P.O.—"The Empire," 264, Flinders-st., Fri., 8.

KOMERUA KLUBO.—L. E. THOMSON, Hardware Club, 350, Little Collins-st., Mon., 8.

MIDDLESBROUGH.—Miss M. L. WARNE, 15, Myrtle-st.—Berlitz School, Thur., 7.

MONTROSE.—Miss M. MOIR, 29, White's-place.

NATALA VERDA STELO.—Miss E. BRENIE, 11, Union-buildings, West-st., Durban.—Mon.

NORTHAMPTON.—Miss OAKES, 48, Clarence-avenue.

NORWICH.—Miss G. CLARKE, 371, Unthank-rd.—C.E.Y.M.S. Rooms, Orford-place (Room 4), Mon., 7.

NOTTINGHAM.—H. O. SCHOFIELD, 57, Caledon-rd.—"The Albert Hall Institute," Derby-rd., Fri., 7.30.

OLDS (ALBERTA), CANADA.—Miss E. M. DOMINY, Olds.—Wed.

PADIHAM (LANCS).—ALBERT THOMPSON, Esperanto School, 44, Station-rd.—Nelson's Temperance Hotel, Wed., 7.30.

PAIGNTON.—H. B. HYAMS, "Terval," Torquay-rd.—Same address, Tues., 8.

PARTICK Y.M.C.A.—Miss J. SCOTT, 247, Dumbarton-rd.—Y.M.C.A. Rooms, Peel-st., Thur., 8.30. 2nd Sunday *Dissero* at 7 p.m., Nov.—June.

PERTH.—JAMES A. COWIE, Western-ave.—North U.P. Church Library Room, Tues., 8.

PLYMOUTH (Tri Urboj).—Miss E. M. SPRY, 19, Park-st.—Unitarian Chapel, Treville-st., Mon., Wed., and Fri., 7.30—9.30.

REDHILL.—S. S. JENNINGS, 26, Linkfield-lane.—"Elmside," 4th Wed., 8.15 p.m.

ROCHDALE.—Miss A. MAXWELL, 4, Brocklebank-rd., Fir-grove.—W.E.A. Chambers, 84A, Yorkshire-st., Thur., 8.

ROTHERHAM Y.M.C.A.—G. H. JOHNSON, Burnham House, Oxford-st.

ROYSTON.—Mrs LAND, Victoria-crescent.—Clock House, Mon., 8.

RUGBY.—Moat Hotel, Regent-st., Tues., 7.30.

SCOTTISH LEAGUE OF CATHOLIC ESPERANTISTS.—Miss M. H. CORCORAN, 9, Bellevue-st., Edinburgh.—Thur., 8.30.

SHEFFIELD.—Mrs. WALLER, 58, Acher-rd., Millhouses.—Builders' Exchange, Cross Burgess-st., Fri., 8 p.m.

SHEFFIELD Y.M.C.A.—W. HAGEN, Glengarth, Handsworth.

SHIPLEY.—Miss M. SCHOFIELD, 7, Hope View.—Co-operative Hall, Westgate, Fri., 7.30.

SOHAM (CAMBS).—G. F. FENTON, Soham (Cambs.).

SOUTHPORT.—Mrs. PIERPOINT, Ainsdale.—Temperance Institute, London-st. Mon., 8.

SPEN VALLEY.—ERNEST BENTLEY, 6, Old Robin, Cleckheaton.—Museum, Leeds-rd., Millbridge, Wed.

ST. ANDREWS.—Miss N. REID, 64, Market-st.—Tues., 8.

ST. HELENS (LANCS).—Miss F. DAVIES, 60, Claughton-st.—Central Chambers, 2, Market-st., Wed., 8.

STOCKTON-ON-TEES.—T. R. WILSON, 6, Dovecot-st.—Lit. and Phil. Institute, Mon., 7.30.

STOKE-UPON-TRENT.—Miss A. VIGGARS, Hope Cottage, Silverdale, Staffs.—Church Inst., Thur., 8.

SUNDERLAND.—W. COWLEY, 6, Norfolk-st.—I.L.P. Rooms, Blandford-st., Thur., 7.30.

"NIA RONDETO."—Rev. W. A. TODD, 15, Gillside-grove, Roker.

SYDNEY (Zamenhofa Klubo).—Miss A. LUSBY, 223, Stanmore-rd., Stanmore.—80, Bathurst-st., First Thur., 8 p.m.

TODMORDEN.—H. CROWTHER, 8, Oak Mount.—Wild's Temperance Hotel, 1st and 3rd Wed. in month, 7.30.

TUNBRIDGE WELLS.—J. A. GILL, Lower Green-rd., Rusthall.

WARRINGTON.—Miss D. E. PARSONAGE, 14, Bewsey-rd.—27, Bewsey-st., Wed., 8.

WESTERN AUSTRALIA ESP. SOCY.—Miss M. WATSON, Stott & Co.'s College, St. George's terrace, Perth.

WISBECH.—Miss E. MILLER, Wistaria Ho.—The Institute, Tues., 8.

★ THE ★
ESPERANTO
BLEND OF
Purest Scotch Whisky

Is renowned for the quality of its ingredients, and its freedom from "bite." It is mellow and mature, and no re-union is complete without it.

Price - 55/- per dozen
or 5/- per bottle.

(To Esperantists, price per dozen, £2 6/-).

Carriage paid. Terms: Cash with Order.

Payments may be made by Cheque on the Cekbanko Esperantista.

KORESPONDU ESPERANTE PREFERE.

BUCHANAN SCOTT & CO.,
Garthland Street, GLASGOW.

To THE SECRETARY,
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated),
17, HART STREET, LONDON, W.C.

I hereby apply to be elected a Member of the BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated), and enclose the first Annual Subscription, 5s.

I agree to be bound by the Memorandum and Articles of Association and Bye-Laws as they now exist or may be hereafter altered, and will do all in my power to further the interests of the Association, and the language, Esperanto of Dr. L. L. Zamenhof.

Signature _____

Nationality _____

Rank, Profession, or Occupation _____

Address _____

Date _____

N.B.—A copy of the Rules is sent to each Candidate.

GRECC
SHORTHAND

The BEST for ALL Languages

Marvellously easy to learn, because of the simplicity of its basic principles. It has but few rules, and these are presented in such simple language that they may be readily comprehended by even young Students.

All of the characters are light; no shading is required. This gives to Gregg Shorthand freedom in movement.

Position writing is avoided; that is, every character is written on the line of writing—or the line may be dispensed with altogether.

The vowels are written in their natural order, and each essential sound is expressed by a definite sign. This makes the reading as sure as the reading of longhand.

Can be learned in one-quarter of the time necessary for the older method. This is a great advantage to the student whose time for study is limited, because it allows more time for the study of other subjects.

Write for Booklet E, and we will send copy of our Magazine free. First Text-Book, Sixpence.

THE GRECC PUBLISHING COMPANY,
21, Harrington Street, Liverpool.



Jam gajnis 300 Grands Prix, Orajn Medalojn, k.t.p. privilegio, al L.M.M. la Reĝo de Anglujo, S.M.M. la Reĝino, S.P.M. Reĝino Alexandra; ankaŭ al la Popolo jam de preskaŭ 200 jaroj.

'La Ondo de Esperanto'

Monata ilustrata jurnal, eldonata en Ruslando.

1916—VIII.-a—jaro.

La jurnal aperas akurate la 1-a daton novstilo. Ciu kajero havas 16—24 paĝojn. For. mato 17×26 cm. La kunlaboradon partoprenas ĉiulanda Esperantaj verkistoj. Literaturaj konkursoj premiataj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Korespondafako.

Por progresigi la esperantan sciencan literaturon la jurnal senpage donos al la abonantoj en la jaro 1916: 1-an parton de granda, 360-paĝa, populare-science verko de Profesoro de Moskva Universitato, K. A. Tumirjazjev:

"LA VIVO DE KRESKALOJ."

Tradukita de Doktoro Andreo Fiser.

La abonpagon—2 rubloj = 2,120 sm. = fr. 5,35 = mk. 4,32 = kr. 5,64 = 4 šil. 3 p. = 2,56 gul. = sved. kr. 3,84 = 1,03 dol. (laŭ la posta internacia konvenio)—oni sendu al Moskva Librejo "Esperanto" (Moskvo, Lubjanskij pr. 3, Ruslando) poštmandate, papermone, bankĉeke aŭ pere de enlandaj esperantaj librejoj.

Car dum la milito la poštmandata institucio ne funkciias, la eksterlandanoj tre oportune povas aboni al la jurnal, sen kurza perdo kaj multaj poštelspezoj, sendante 17 respondkuponojn en rekondita letero.

La auncio en la Korespondafako kostas 30 kop. ali 3 respondkuponoj.

THE ESPERANTO TEACHER.

By HELEN FRYER.


New and Enlarged Edition.

52 pages of new matter, consisting of English-Esperanto vocabulary and prose readings.

Same price as before: 6d. net, 7½d. post free.

PURA KAKAO, kia estas tiu de FRY, konsistas sole el bonajo: ĝi estas emulso prenota en formo fluideca, samtempe trinkajo kaj nutraĵo, tute malsama je infuzajo el folioj aŭ beroj.

Fabrikistoj, laŭ specialaj sigelitaj patentoj de ankaŭ al la Popolo jam de preskaŭ 200 jaroj.



BRITA LICO DE ESPERANTISTAJ SOCIALISTOJ.

En milita tempo pretigu por la paco. Anigū nun.

Hon. Sek.:—H. HYAMS, "TERVAL," PAIGNTON.

DUA ELDONO

Esperanto-English Dictionary

(Vortaro Esperanto-Angla),

VERKITA DE

EDWARD A. MILLIDGE.

496-paĝa volumo, fortike tole-bindita.

Prezo 5s. ; afrankite 5s. 3d.

Če Brita Esperantista Asocio. 17, Hart street, London, W.C.

Jus Aperis.

LA VENECIA KOMERCISTO.

La Dramo

The MERCHANT OF VENICE

DE
SHAKESPEARE.

Tradukis
ALFRED E. WACKRILL

(Membro de la Akademio Esperantista).

Prezo: 1s. 7½p. Tole bindita 2s 2p. afrankite.

BRITISH ESPERANTO ASSOC., 17, HART STREET, W.C.

The BRITISH ESPERANTIST.

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

VOL° XII. N-RO 133.

JANUARO, 1916.

PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO. — *En Granda Britujo, afrankite: por unu jaro, 3 ŝilingoj; unu numero, 3 pencoj.*

Eksterlande, afrankite: por unu jaro, \$0.75, fr.4, M.3; laŭ internacia mono, Sm.1.50.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komencigo de ĉiu monato, kaj devas esti pagataj per poštmandato aŭ Ĉebanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, 17, Hart-street, London, W.C.

REDAKCIO. — Manuskriptojn, k.t.p., oni volu sendi al la Redaktora Komitato, 17, Hart-street, London, W.C. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn volu ĉiam certigi, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la originalaj eldonintoj permesas la represigon.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p. Ordinare oni ne resendas artikolojn neakceptitajn.

ANONCOJ. — Pri anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, 17, Hart-street, W.C. — Privataj anoncoj pri Esperantistaj naskiĝoj kaj edziĝoj estas empresataj po 2 ŝilingoj por kvar linioj.

Al Ĉiu Samideano Felician kaj Prosperan Novjaron!

La Propagando de Esperanto.

La propagando de Esperanto estas perioda temo. Ĝi estas tiom priparolita kaj priskribita, ke, ofte ĝia apero estas aŭ neremarkita, aŭ rimarkita kvazaŭ io negrava.

Sed, se ni serioze priatentos la historion de Esperanto, nin plenigos la sento de admirado kaj danko al la pli fruaj Esperantistoj, kiujn oni povas nomi la "Pioniroj" de nia movado. Ilia laboro devus nin instigi al la deziro ilin egali kaj preni sur nin la mantelon de la misiisto por disvastigi la scion, kiun ni jam gajnis. Malfeliĉe la Esperantistoj tre ofte nur altigas la ŝultrojn kaj lasas al la oficistoj de siaj grupoj la gravan rolon de propagandistoj.

Povas esti, ke iu membro opinias, ke li aŭ ŝi mem ne posedas la necesan talenton nek kapablon por tia laboro, sed tiu ideo, mi kredas, ne rilatas al nia afero, ĉar nia ĉiutaga vivo havigas al ni multajn okazojn por diri ion, iam, al iu, pri Esperanto.

La unua kondiĉo de la plenumado estas, kredi, ke io estas plenumebla, kaj ni devus memori, ke ni ŝuldas nian scion de Esperanto al iu eble nekonata propagandisto, kiu kredis je sia idealo kaj agis konforme.

| ENHAIVO. | PAGO. |
|---|-------|
| La Propagando de Esperanto. JOHN A. FERGUSON | 1 |
| Jam pli ol unu Jaro | 3 |
| Amontoj. "TAGULO"... | 4 |
| Vera Sperto. A. K. VACHER... | 4 |
| Ču la Planedoj estas Loĝeblaj. J. BREDALL | 5 |
| Libraro kaj Gazetaro | 7 |
| Logic and Language. G. WILSON BURN | 7 |
| Alilandaj Sciigoj... | 8 |
| La Eklezia Esperantista Ligo... | 9 |
| Chronicle—Coming Events | 10 |
| B.E.A. New Members, Fellows, Examinations, Council Meeting, Notices, F.K.I. | 12 |

700.072-3. 12
1916

apartajojn. Armita per tiu ĉi nobla celo ni povas iri al la ne-esperantistoj. Ni diros al ili tion, kion Esperanto jam plenumis, ankaŭ, kion ni estas konvinkita, ke ĝi ankoraŭ povos fari; ni diru al ili, ke la neesperantisto estas la persono, kiun ni pleje serĉis.

Interne de niaj grupoj, ni havas bonegan rimedon por fari propagandan laboron, sed estas necese organizi ĝin. Propagandan komitaton oni povus starigi. La kunveniganto devas esti kompreneble membro kun sperto pri tia grava laboro kaj amo por ĝi. Mi kredas, ke, pro la nova karaktero de la laboro, entuziasmo vekiĝos inter multaj, kiuj ordinare faras nenion dum la tuta jaro. La komitato inter aliaj devoj, agos kiel "Gazetara Klubo," kaj al unu ekzemplo mi volas altiri vian atenton.

En la BRITISH ESPERANTIST por Oktobro aperis artikolo sub la titolo "Esperanta Ruĝa Kruco," kun la peto, "Bonvolu publikigi ĉi tiun artikolon nacilingve en viaj lokaj gazetoj." Ĉu tiu ĉi peto estos iam plenumita aŭ ne, mi ne scias, sed kredeble estas, ke multaj niaj gemembroj tralegis la artikolon kaj, kvankam dezirantaj ĝin traduki, sin detenis, pro la timo, ke eble, iu aŭ alia membro jam tradukas ĝin. La rezultato povas esti, ke ni perdos tiun ĉi okazon por reklami nian lingvon en nia regiono. Kontraŭe, se ekzistus tia komitato, artikoloj aperintaj en Esperantaj gazetoj, estus legataj kun la celo trovi materialon taŭgan por la propagando. Tiamaniere, la loka Societo certigus ke, laŭ eble, la lokaj jurnaloj ricevos ĉion utilan, kaj la publiko scius pli multe da nia afero.

La individua membro estas libera sekvi sian inklinon, kie ajn kaj kiam ajn li volas, limigata nur de sia aspirado kaj sia interpretado de idealoj; ke li povas esti tre sukcesa, ĉiu konas. Ni memoru la konvertiĝon de S-ro Carlo Bourlet, la fama konata franca matematikisto, kaj ni konsideru ĉiun varbotulon kiel estontan eminentulon. Certe ĉie ni havas niajn Bourlet'ojn sub aliaj nomoj. Se vi estas certa pri via viktimo, ke li farigas bona Esperantisto, daŭrigu la atakon, kaj en la plimulto da okazoj yi triumfos.

Legante la historion de la naskiĝo de Esperanto, oni estas frapata de la malgajaj scenoj, kiujn devis rigardi la junan Zamenhof dum siaj fruaj jaroj en Bielostok; la multaj disputoj kaj malpacoj, kiuj okazis tiel ofte inter la gentoj parolantaj diversajn lingvojn. Tio ĉi faris fortan impreson sur la pensema knabo, kaj nuntempe, kiam nia majstro havas la agon de kvindek ses jaroj, li logas en la malfeliĉa pola urbego Varsovio, nun en la manoj de malamikaj soldatoj; kaj ni, kiuj bone scias, kiel li laboris dum la tuta vivo por la realigo

de tiu glora ideo, la amikigo de la nacioj; ni, kiuj scias, ke sian genion li donis plenkore al tiu bona celo, ni estus ja, tre malvarmaj, se nia simpatio ne irus al li en la nunaj cirkonstancoj; kaj hodiaŭ, dum la homoj sin buĉadas, ĉu ne estas taŭga momento por dediĉi nin denove al la movado, kiu celas la pacon, kiu celas la interfratigo de la homoj? D-ro Zamenhof per sia simpla lingvo liveris al ni la rimedon; ni povas fari nian eblon tiom pli facile, dank' al la propagandistoj, kiujn entuziasmigis D-ro Zamenhof. Jam multo estas gajnita, sed ni devas daŭrigi senĉese la laboron, kaj por tio, ĉiu Esperantisto devus farigi propagandisto. Ni posedas la inspiradon de lia grandanimeco, kiun la mondo certe iu tagon alte taksos.

Ni povas rigardi la malfacilajn problemojn en la mondo kiel la idojn de la nescio. Ekzemple, la nescio pri la legoj de la sano naskas malsanon, kaj same, la nescio pri la lingvoj de niaj najbaroj naskas malkomprendon. La milito farigas grandmezure pro la manko de komuna lingvo; do ni povas logike rigardi la militon kiel antaŭforigeblan malsanon; malsano naskita el la mallumo de la nesciado, antaŭjugó kaj malkompreno. Ju pli longe la nacioj prokrastas la ellernadon de Esperanto, des pli longe daŭros la mallumaj tagoj de reciproka suspeko.

Ni konstatos el tio, ke la propagandisto havas altan motivon por la disvastigo de Esperanto tra la mondo. Ni povas ankaŭ konstati alian grandan veron, nome, ke ju pli ni penos propagandi, des pli ni ricevos plezuron el nia lingvo. Ĝi aspektos pli bele, kaj kredeble, por la unua fojo, ni ekvidos la noblecon de ĝia celo. Ĝi ne signifas la blindan sekvadon de iu dogmo sed ĉiam instigas nin al la plej bona servado al la homaro.

Unu bona servo, kiun ĉiu Esperantisto povas fari por la progreso de nia afero estas simple la portado de la verda stelo. La stelo estas ne nur tre bela insigno, sed la portanto ricevas memfidon kaj eĉ farigas iom fiera pri ĝia signifo. Mi legis en la BRITISH ESPERANTIST, kiel fondigis la Esperanta grupo de internigitaj belgaj soldatoj en Harderwijk, Holando. La *Holanda Pioniro* raportis, kiel S-ro Bonobo, U.E.A. delegito, renkontis belgan soldaton, kiu portis verdan stelon sur sia uniformo. Ili tuj interparolis, kaj la rezultato estis la stariĝo de tiu Esperanta grupo, nun bone konata de ĉiu leganto de nia gazeto. Sed la *Holanda Pioniro* plue diris: "La verda stelo estas propaganda insigno, kiun ĉiu Esperantisto portas *ĉiam*." Estus bone, se ĉiu el ni povus tio diri pri nia propra urbo. Ĝi estas la unua paño de la propagand-

isto, kaj samtempe reklamas Esperanton plej efektive. Vi povas porti ĝin en la oficejon, en la laborejon, en la lernejon, kie ajn vi perlaboras. Viaj kolegoj baldaŭ deziras koni ĝian signifon, kaj jen, post iom da klarigo, vi rajtas doni al ĉiu vera scivolemulo unu el la bonaj propagandiloj eldonitaj de la B.E.A. Kaj cetere kiam ni uzas Esperanton antaŭ la neesperantistoj, ni uzu ĉiam la plej bonajn frazojn; ni elparolu la vortojn kiel eble plej klare, por ke ni rekomendu nian karan lingvon al la publiko.

Ni ankaŭ povas antaŭenpusi nian aferon per la uzado de propagandaj poštarkoj por nia korespondado; la jeno montras unu tute neatenditan rezultaton. Unu mia amiko deziris katalogon de Londona libroeldonisto; li sendis sian peton sur propaganda poštarko, kaj post kelkaj tagoj ricevis la deziratan katalogon, ankaŭ leteron de la firmo, kun la peto, ke li faru Esperantan tradukon de iu libro eldononta. Mia amiko ne sentis sin kapabla plenumi ĝian peton, sed li tuj sendis la leteron al la ĉefkonsulo de la U.E.A. en Londono. Poste li ricevis kun plezuro pluan leteron de la firmo, dankanta lin pro tio, ke la servoj de tradukisto estis jam ricevita pere de la U.E.A.

Tiu rakonto montras, kiel eĉ tute simpla ago portos rezultaton favoran al nia afero. Ni kredu, ke la fina triumfo de Esperanto signos la venkon de malamo inter la nacioj; ke la libera interrilatigo estas la fundamenta kondiĉo de frateco; ke la benota miljaro ne efektiviĝos sen komuna lingvo. Kun tiu kredo ni propagandu Esperanton.

“Kia reĝa rava revo vin alvokas al batal’,
Por la vera homamanto kia sankta ideal’,
Unu homa amikaro, unu familia rond’,
Unu lingvo, unu koro, unu celo tra la mond’.”

JOHN A. FERGUSON,
Glasgow.



Jam pli ol Unu Jaro.

Pli ol unu jaro pasis de la komenco de la nuna militego. Ni ne volas intence impresi la imagon de niaj legantoj per priskribo de teruraĵoj, kiuj fariĝas... Ĉiu sentema animo, ĉiu pensema menso estas jam sufiĉe impresita... Tamen ni ne povas nin deteni por ne citi kelkajn nombrajn konkludojn.

Iu angla statistikisto prikalkulis proksimume la monajn perdojn, kiujn jam estas kaŭzinta la milito dum unu jaro al la militantaj nacioj, preterlasante la malprofitojn, kiujn nepre suferas neŭtralaj ŝtatoj. Laŭ tiu scienculo, la elspezoj kaj malgajnoj atingas la sumon de

preskaŭ dek miliardoj da spesmiloj dum la unua jaro, t.e., pli ol 250 milionoj da Sm. ĉiutage, aŭ pli ol 10 milionoj de Sm. ĉiuhore!... Ni ripetas, ke tiuj ĉi perdoj koncernas ekskluzive la *militantajn* naciojn.

Pri la perditaj homaj vivoj ni ankoraŭ ne havas suman statistikon. Tamen la registo de Granda-Britujo, en la persono de S-ro Asquith, komunikis, ke la brita armeo kaj maristaro perdis dum la jaro 330 000 homojn, el kiuj 61 000 estas mortintaj kaj 196 000 grave vunditaj. La prusa (ne germana!) armeo perdis 1 500 000 homojn.

Cu tiuj ciferoj ne estas sufiĉe impresaj?...

Malgraŭ tio estas tre malmultaj voĉoj, kiuj kuragas elparoli la vorton “paco.”... Tiu ĉi vorto indignigas... Gi indignigas ne nur tiujn obstinajn militaristojn kaj ŝovinistojn, kies devizo estas: “Daŭrigi la militon ĝis ĉio subiĝos al *nia* potenco kaj volo.”... Gi indignigas eĉ multajn principajn kaj sincerajn pacemulojn, ĉar ili timas, ke *antaŭtempa* paco ne garantios ĝian firmecon kaj ne elradikigos la militaristajn ideojn, ke ĉi-momente konkludita paco estos daŭrigo de antaŭ-milita *regimo* de “arma paco,” de ĉiamaj militminacoj, de konstanta kresko de armiĝoj, de internacia malkonfido, k.c.

Eble ili estas pravaj....

Tamen...la militego ne povas ja daŭri eterne. Pli-malpli frue ĝi finiĝos. Ni devas antaŭvidi tiun finon—ni devas esti pretaj por ĝin akcepti....

Spite la nunaj malamoj, disigantaj la militantajn ŝtatojn, oni ne devas forgesi, ke fundkore ĉiuj popoloj havas aliajn sentojn, alispecajn ideojn; en ĉiuj landoj la intelektaj fortoj meditas pri estonta repaciĝo kaj komuna—*ciunacia*—kunlaborado en la kampo de tuthomara progreso kaj kulturo.

Cu tiaj meditoj estas iluzioj, neefektivigeblaj revoj?...

Cu, vere, la kruela, terura, kontraŭmorala leĝo de ĉiama, senindulga batalo pro ekzistado, fatale nevitebla en la naturo, ne povas por la homaro fariĝi malpli ĉiopova kaj anstataŭigi per pli nobla, pli animaltiga leĝo de reciproka kunhelpado?...

La homaro ja distingiĝas de la bestaro per la dia dono de la parolo. Ni uzu do tiun potencan donon por malestigi “la miljarajn murojn inter la popoloj dividitaj”! La popoloj malfermu la blindajn (aŭ pli vere “blindigitajn”) okulojn kaj konvinkiĝu, ke la suna brilo estas senfine potenca, kaj ke la bela mondo estas sufiĉe vasta, por ke ĉiu homo trovu sian pecon da tero kaj sian parton de felico!...

A.F.

Amontoj.

“AÜSKULTU,” diris vaga vendisto en la mezo de la vilaĝa placo. Knabinoj haltis kaj poste alproksimiĝis kaptitaj per la voĉo de la maljuna vendisto.

“Aŭskultu, infanoj miaj.”

Antaŭ multaj jaroj vivis unu princino, kiu estis tiel bela, ke la matena lumo origis, kiam ĝi banis ŝian korpon. Kaj la tero trematis muzikante kiel harpo pro la tušo de ŝiaj piedpintoj. Kiam fulmis ŝiaj okuloj, tiam tondris en viraj koroj.

Multaj kavaliroj venis por amindumi ŝin, sed nur du trovis placon en ŝiaj okuloj. Ili estis du princoj leone fortaj kaj diinde belaj. Dum longa tempo al ambaŭ egale ŝi klinis la orelon, sed ne decidis, kiun ŝi feliĉigos per sia amo. Pro ŝia longa flirtado rezultis jaluzo inter la du princoj, kaj sekvis malpaco en la regno.

Tiam la reĝo diris al sia filino: “Faru finon al viaj kapricoj, por ke fine venu paco en la regnon.”

“Ce tio fulmis ŝiaj okuloj kaj ŝi diris: “Ili kune venu al mi.”

Kiam ili venis ŝi demandis al ili, kion ili faros por montri sian amon al ŝi. Kaj la vento kun ĝojo forportis la muzikon de ŝia voco.

Unu prundo respondis, ke li mortigos pramane leonojn kaj tigrojn por ŝi; sed la alia respondis, ke li turnire batalos kontraŭ sia rivalo.

Tiam ŝi mallaŭte ridis, kaj la muziko en ŝia rido vibre kaptis kaj pli flamigis ilin.

“Ne, tia kuraĝo estas banala ĉe niaj kavaliroj,” ŝi diris.

“Do, kion ni faru?” ili demandis.

“Jen estas du pokaloj,” ŝi diris, “unu estas kun mortiga veneno; la alia estas viviga vino. Vi elektu kaj trinku. La postvivanto edziĝu kun mi.”

Sed ili paligis kaj volis foriri.

“Ce tio, ŝi ekstaris flustrante al ili kruelajn mokojn, kaj la fulmo de ŝiaj okuloj estis akraj glavoj. Kaj dum ŝi staris la vento forblovis ŝian robon, tiel ke vidigis la beleco de ŝia figuro; la lumo ĝojis envolvante ŝiajn membrojn.

Arda deziro kaptis la du princojn kaj skuis iliajn korojn. Ili ambaŭ prenis pokalon, kaj ambaŭ englutis.

Nun la knabinoj sur la vilaĝa placo senspire apudiĝis al la vaga vendisto, ĉar rakonto estas rakonto ĉie kaj ĉie sur la tuta vasta mondo; kaj vendisto—vendema.

“Kaj unu prundo paligis, pli paligis, kaj falis kaj restas senmova: lia koro ĉesis bati al li.”

“Ce la knabinoj estis tomba silento. Poste unu demandis: “Cu estas la fino?”

“La maksimo estas la fino,” respondis la vendisto, proponante siajn komercajn.

“Kia estas la maksimo?”

“La maksimo estas: Homo proponas, sed Dio disponas. La princino amis la mortintan princon kaj nur volis provi lin per la trinkaĵo.”

“Kiel ŝi volis provi lin?” diris la knabinoj pli scivoleme.

“Car neniu trinkaĵo estis venena. La princino mortis de timo.”

TAGULO.

Vera Sperto.

Originale verkita de A. K. VACHER.

Transirante Hyde Park'on iun malvarman Aŭtunan vesperon, mi vidis knabeton ĉirkaŭ naŭjaran sidantan sur benko plorantan. Li havis malfortikan aspekton kaj tremetadis de malvarmo, ĉar akre blovis orienta vento, kaj tie kaj ĉi tie montriĝis tra lia ĉifona vestaĵo lia nuda haŭto.

Mi sidigis apud li kaj petis sciigi pri la kaŭzo de lia malfeliĉo. Li responde diris, ke patrono li ne havas; al la patrino ŝus okazis strat-akcidento, kiu, kvankam ne grava, tamen kelkajn tagojn neebligos al ŝi labori, kiel kutime je la dompurigado. Do ŝi forsendis lin por fari kelkajn aĉetojn, doninte al li la necesan monon. Sed renkontiĝinte kun konato survoje, li ne povis ne montri al li la monon, ŝerco ŝajnigante, ke ĝi estas lia propra. La konato tuj ekpremis ĝin for de li kaj spite lia petado, anstataŭ redoni ĝin, forte vangofrapis lin kaj forkuris, portante la monon. Ĉe tiu punkto de la rakonto refalis grandagute la larmoj.

Nu, estante iom skeptikema pri la vereco de tiaj kortušantaj historietoj, bone sciante, ke ofte ili estas nur mensogoj rakontataj por kompatigi la malkorulojn, mi decidis ne doni monon al la ploranto sed iri al la logejo de la patrino por viziti ŝin, sciigite, ke ŝia logejo estas for de mia sidloko nur dekminuta marŝado — tute proksime de la stacidomo Viktorio.

Mi proponis, ke li akompanu min, kaj mia junu amiko forviŝis siajn larmojn kaj prenante sur ŝin pli feliĉan mienon, li tuj ekleviĝis de la benko.

Jen ridante, jen babilante, ĉiam marŝante ĉe mia dekstra flanko, la knabeto montris sin tre interesa kaj bone informita kunulo, havinte scion pri multaj aferoj ne kutime konataj de tiaj junuloj. Li pritraktis pri la asekura lego; la proponata lego de Irlanda aŭtonomio kaj eĉ pri la alilandaj aferoj. Ju pli mi interesigis pri lia konversacio, des pli mi ne povis ne miri, ke tia ĝentila, bone informita knabeto troviĝas en tia malfeliĉa,

malalta vivrango. Liaj kapabloj certe meritas pli bonajn ĉirkaŭaĵojn kaj pli bonan edukon ol jam ili ricevis. Alproksimiĝante al la stacidomo Viktorio, la knabo proponis, ke mi eniru la tiean unuaklasan atendejon por pripaoli kun la servavirino, kiu konas lian patrinon kaj de ŝi mi povus ricevi tian informon pri liaj malfeliĉaj cirkonstancoj, kiajn li ne povus doni.—Li dum ĉiuj restos ekstere, por ke lia ĉeesto ne malhelpu nian liberan interparolon, kaj ankaŭ pro tio, ke tia malpura, ĉifone vestita estaĵo ne devas eniri la unuaklason ĉambregon.

Mi konsentis lian proponon sed dezirante, ke la atendado ne estu al li enuiga mi volis eligi el mia mansaketo mian monujon por elpreni unu pencon, por ke li povu okupi sin agradable manĝante kukon aĉeteblan ĉe proksime kukbudo. La knabo tamen tute ne volis permesi tion dirante, ke li ne malsatas, kaj ke li preferus resti, kie li staras ĝis mi eliros, pro timo, ke vidante lin ne akompanatan de mi, iu polican aŭ stacidoma oficisto elpelos lin.

La atend-ĉambristino tuj interesigis, kiam mi komencis mian rakonton sed ne permesante, ke mi daŭrigu, ŝi intermetis : “Jes, mi kredas, ke mi konas la knabon laŭ prisikribo, sed neniam mi vidis lian patrinon nek lin, nek havas ian scion, pri kie ili loĝas. Jam hodiaŭ tri sinjorinoj rakontis al mi la saman historion kaj ĉiu el ili perdis aŭ sian monujon aŭ la orajn monerojn, kiujn ĝi enhavis.

Malfermante mian saketon por vidi, ĉu hazarde io mankas, mi vidis mian naztukon, mian monujon kaj la ceterajn enhavojn kuŝantajn tie sendangere.—Mankas ŝajne nenio !

Dum mi enrigardis mian saketon la virino alproksimiĝis al la pordo kaj malfermis ĝin, sed kiam ŝi sciigis min, ke neniu knabo staras ekstere, tiam mi ekfariĝis iom suspektanta pri li. Mi demandis al preteriranta portisto, ĉu li vidis mian junan amikon—

“Ne,” li respondis, “mi ne vidis lin, sed se hazarde mi vidus lin, mi certigas ke nepre mi estus forpelinta lin, ĉar tiaj friponetoj svarmas kiel insektacoj en la ĉirkaŭaĵo. Ili taŭgas por nenio kaj okupas sin nur per malbonajoj.” Reirinte la atendejon kaj pli zorge enrigardinte mian monujon, mi vidis, ke kvankam mankas neniu el la kupraj moneroj, kaj nur kelkaj el la arĝentaj, la pli interna ujo tamen, kie mi entenigas la orajn, estis malplenigita !

Pli kaj pli mi miris pri la lerteco de tia junia knabeto, kaj mi opiniis, ke se liaj nerefutebaj talentoj estus metitaj al bono anstataŭ al malbono, li fariĝos eminenta jonglisto posedante tiajn ĉarmajn konversaciajn kapablojn kaj tian eksterordinaran lertecon pri la tromparto.

— Pri mi, nu mi filozofe kontentigis min pensante, ke :—

La prudenton oni gajnas nur per la sperto !

Ĉu la Planedoj estas Logeblaj?

Verkita de J. BREDALL.

La demando, ĉu ekzistas aliaj mondoj, sur aŭ en kiuj loĝas sentemaj estaĵoj, agitadis la animojn de pensuloj jam de tiam, kiam oni komencis konsenti, ke la malnovaj teorioj pri la tero kiel centro, ĉirkaŭ kiu rondiras malgrandaj sferoj kaj lumpintoj, estas neteneblaj, kaj ke nia globo estas nur unu el vasta aro da globoj, kiuj per nekredebla rapideco moviĝas tra sensilma universo. La problemo estas efektive unu el la plej gravaj, kiuj vekas la konsideron de la homa animo, ĉar se post zorga konsidero, oni decidus, ke nur sur la globo, kiun ni nomas “tero,” ekzistas estaĵoj posedantaj sendependan penson kaj agpovon, tiam oni devas konsideri, kio estas la celo de la Kreinto, konstruinta el la gasoj de la universo etan sferon, sur kiu post jarcentoj loĝus homoj intelligentaj, posedantaj la povon regi kaj direkti ĉiujn terajn aferojn, kaj fabriki ilojn por studi la eksteran universon. Se kontraŭe, post esploro, ni konvinkuĝus, ke en la malproksimaj sferoj ekzistas estaĵoj kun intelligenteco egalvalora al la nia, aŭ eĉ pli fortaj, niaj respektego kaj miro devus esti senlimaj, kaj kun la Psalmisto ni devus kanti “Kio estas homo, ke Vi zorgas pri li ?” Kiam ni pensadas pri la universo kaj ĝiaj sennombraj milionoj rapide rondirantaj, ĉiu laŭ sia fiksa orbito, ni povas forpeli la demandon pri la loĝebleco de tiaj malproksimaj sferoj, ŝajne nur lumpintoj eĉ tra la plej grandaj teleskopoj (kaj kies lumo, vojagante je preskaŭ po 300 000 kilometroj (186 400 mejloj) en ĉiu sekundo, alvenas teren nur post jarcentoj), ĉar tio estas ekster la homa diskutpovo. Al ni mankas la materialo por la enketo. Tamen, la eltrovo de la spektroskopo ebligas al la astronomo analizi la substancojn de la sunoj, nomitaj de ni astroj fiksitaj (senmovaj), kaj per tiu ilo ni scias, ke ili konsistas el brulantaj gasoj, analogaj al la gasoj, el kiuj estas farita nia suno, kaj, simile al ĝi, ĉiuj, aŭ kelkaj el ili estas ĉirkaŭitaj de planedoj tiom taŭgaj, kiom la tero, por la vivo. Ekster tio ĉio estas nur supozo, tial la esploranto bone faros, se li limigos sian atenton al la sferoj de la suna sistemo, pri kiuj per la zorga laboro de multaj astronomoj, kaj per la helpo de la teleskopo ni multe konas.

Antaŭ ol diskuti pri loĝebleco, necese estas hipotezi pri nia kompreno de la vorto “loĝantoj.” Ĉu ni intencas nin informi kiom eble, ĉu iu el la planedoj de la suna sistemo enhavas

estajojn kun ecoj similaj al tiuj de la tera homaro, aŭ ĉu ni estos kontentaj, certigante nin, ke la vivo en tiuj malproksimaj sferoj estas nur tiu de tiaj estajoj kiel zoofitoj, sentemaj por la tušo aŭ lumo, sed ne posedantaj penspovon aŭ la deziron de memkonservo, kiu, oni certigas, estas la unua lego de la naturo? Inter tiuj du ideoj pri la vivo ekzistas sur la globo multaj gradoj, kaj estas eble kredi, ke sur aliaj planedoj povus ekzisti multaj aliaj. Ĉiu studento devos decidi pri sia vidpunkto, sed por konsideri la demandon "Kio estas la Vivo?" estas rekomendinde teorii pri difino. La vivo povas ekzisti sur la tero nur inter tre mallargaj limoj de temperaturo kaj atmosfero, ekzemple la homa vivo estas nur ebla, dum longaj periodoj, en temperaturoj, kiu varias inter grado iomete malsuper zero ĝis 45° super, kaj povas iamaniere ekzisti nur inter 100° malsuper kaj 95° super zero. La vegeta vivo ne povas ekzisti en temperaturo malpli ol 4° aŭ 5° super zero. Akvo estas la ĉefa necesajo de la besta kaj vegetaja regno. Nek unu nek alia sen ĝi povas ekzisti. Ankaŭ estas necese, ke la atmosfero estu taŭge densa, kaj konsistu el gasoj tiel precize miksitaj kiel necese por ebligi la spiradon de la bestoj kaj kreskaĵoj, kaj tre malgranda ŝango en la proporcio de la gasoj estas dangera por la vivo. Do, kiam ni studas la demandon pri la ebleco de la vivo en aliaj planedoj, ni devas ne forgesi la demandon, ĉu tiaj mallargaj limoj troviĝas en iu el tiuj sferoj. La suno estas ne nur la centro de la suna sistemo sed ankaŭ la fonto de ĉia lumo kaj varmo en la planedo, sur kiu ĝi havas grandan kaj malsimplan influon. Ĝia diametro estas iom pli ol 1 385 600 kilometroj (865 000 mejloj); tio signifas, ke la supraĵo estas preskaŭ 12 000-oble pli granda, ol tiu de la tero, kaj la volumeno 1 300 000-oble pli granda. La maso aŭ pezoforto estas 332 000-oble pli granda, ol tiu de la tero, kaj ĉirkaŭ 750-oble, ol tiu de ĉiuj planedoj kune. Ĝia specifa pezo estas tia, ke laŭmase la suno havas nur unu kvaronon de la pezo de la tero. Foje mallumaj makuloj estas videblaj sur la supraĵo de la suno, kaj oni supozas, ke tiuj estas aperturoj en la fotosfero aŭ gasema kovrilo, kiu estas la videbla fonto de la lumo, kiu alvenas teren. Ekster la fotosfero troviĝas la kromosfero, maldika ŝelo de memluma ardanta gaso. Ekster la kromosfero estas la korono, vasta kovrilo el vaporoj dika je multaj miloj da kilometroj. La plej zorgaj observantoj kalkulas, ke la temperaturo de la supraĵo de la suno estas $7 000^{\circ}$ C., kaj la interna temperaturo nepre estas multe pli alta. Varmon tiel egan oni nur povas priskribi per la ideo, ke

versita fandita fero similus rivereton de glacio kaj neĝo; do, ni devas, laŭ mia opinio, forigi la opinion de la ĉeesto de tio, kion ni nomas "vivo" en aŭ sur tiu fajra globo. Estas pli utile turni nian atenton al la planedo, kaj laŭ nia rigarda povo, peni starigi opinion pri tio, ĉu ili aŭ iu el ili povas esti la loĝejo de estajoj dotitaj per la vivospiro.

La plej proksima planedo al la suno estas Merkuro, je meza distanco de 35 500 000 da mejloj. Tiu planedo estas videbla nur tuj post sunsubiro aŭ tuj antaŭ sunleviĝo, kaj eĉ tiom estas malfacile ĝin ekвидi en la krepusko. Ĝi estas globo, kies diametro estas ĉirkaŭ 3 000 mejloj (4 800 kil.), kiu turniĝas ĉirkaŭ sia akso en iom pli ol 24 horoj, kaj rondiras ĉirkaŭ la suno en 88 tagoj. Ĝia orbito estas pli ekscentra, ol iu alia planedo. Je la plej proksimo ĝi estas ĉirkaŭ 38 000 000 mejlojn (45 600 000 kil.) da distanco de la suno, kaj je la plej malproksimo 44 600 000 mejlojn, sekve dum unu periodo ĝi ricevas duonon da lumo kaj varmeco. D-ro Russell Wallace en sia verko, *La Loko de la Homo en la Universo*, montras, ke Merkuro ne havas suficien mason aŭ pezoforton por altiri aŭ subteni la akvan vaporon, sen kiu ĝi ne povas esti loĝebla. Ĝi ricevas de la suno, kiam plej malproksima, dekoble plimulton da lumo ol ni teranoj ricevas dum somermezo, kaj la pezoforto estas ĉirkaŭ la duono de tiu de la tero. La meza temperaturo de Merkuro estas ĉirkaŭ 194° C. La akvo bolas je 40° , aŭ eĉ je malpli alta grado. La itala astronomo Sciparelli, en la jaro 1889 eltrovis, ke Merkuro ĉiam turnas la saman flankon al la suno, sammaniere kiel la luno al ni; tio signifas, ke la duono de la planedo ĉiam brilas per la sunaj radioj, malkaŝita al ega lumo kaj varmeco, samtempe la alia flanko troviĝas en ĉiama mal-lumeco, kaj malvarmeco 270° C. malsuper la glacia grado. Posedante tiujn ecojn, ĉu ni ne povas forigi la planedon Merkuro el la diskuto pri la loĝebleco de la planedo?

La alia planedo, kiu rondiras inter la suno kaj la tero, estas Venuso, tiu brila astro, kiu briliges la vesperan aŭ fruan matenan ĉielon, la regino de la ĉieloj, la astro de la paštistoj, nomita de Homero, "Kalisto la Bela." Ĝia mezdistanco de la suno estas iom pli ol 107 000 000 kil. (67 000 000 mejloj), kaj la daŭro de ĝia turniĝado 2 243 tagoj. La diametro estas 7 480 mejloj (11 968 kil.). La atmosfero estas densega, sed laŭ D-ro Russell Wallace tiu planedo havas strangajon, kiu sufici malebligas la bestan aŭ eĉ la vegetan vivon.

Daŭrigota.

Libraro kaj Gazetaro.

Pri Cervantes kaj lia famkonata verko, "El Quijote." Eldonita de Madrida Esperantista Grupo. Prezo Sm. 0.400, 100p.

Por honori la gloran Cervantes la Madridaj samideanoj intencas starigi skulptajon kaj esperas ricevi per la vendo de tiu ĉi verko la monrimedon por tion fari. Bona ideo!

Tiu ĉi brošuro enhavas longan biografion pri la aŭtoro de *Don Kihoto* kaj aliajn tre interesajn artikolojn pri Cervantes: ĉio estas leginda.

"*Don Quijote* ekzistis, ekzistas kaj ekzistas feliĉe por la homoj. Li ne estas ekskluzive de tiu ĉi aŭ tiu lando aŭ gento, ĉar la altruismo estas havaĵo de l' homaro; kaj altruismo kaj kihotismo estas preskaŭ la sama. Ĝi estas io netuſbla nevidebla kaj eterna..." Ĝi estas unu el la elementoj de la Eternulo, kies elemento enkorpiĝas, pli aŭ malpli forte, kaj kiu fariĝas reala al niaj okuloj per tiom da fame konataj homoj, kies nomojn oni legas sur multaj pagoj de la homa historio."

Se vi, kara leganto, iel neniam legis *Don Quijote*, jen estas por vi bona okazo por konatiĝi kun unu el la plej bonaj libroj en la mondo; ĉar ju pli saĝa fariĝas la mondo, des pli ĝi bezonas la saĝecon de Cervantes, kiu pledas, kun la bonhumoro de *Shakespeare*, per spirito kaj imago, por la regno de sama prudento.

Trovigas kelkaj vorteraroj negravaj, kaj supozeble oni forgesis traduki esperanten la hispanan vorton *vulgo*.—SOLOM.

Lia Lasta Ŝanco, komedio en du aktoj, de William Bayle Bernard. El la angla lingvo tradukis Gego. Prezo 7½d., sd. 30, ĉe B.E.A.

La angla originalo, publikigita sub la titolo "His Last Legs," estis ludata la unuan fojon en "Haymarket" Teatro, Londono, la 15an de Oktobro, 1839; laŭ la moderna vidpunkto tiu ĉi komedio estas eble iom tro malnovmoda, sed tio ne deprenas de ĝi multon. Ĝi estas tute taŭga por la prezentado en Esperantista kunveno, kaj krom tio ĝi estas leginda ĝis la lasta linio. La flua stilo subtenas la antaŭan reputacion de la tradukinto, al kiu ni ŝuldas dankon, ĉar li ja liveras al ni bongustan antidoton kontraŭ la mizeron.—SOLOM.

Esperanta Krestomatio. Compiled by A. A. Saharov, Moscow. Price 5d., post free, from the B.E.A.

This is a very handy little book, which can be strongly recommended to all Esperantists, and particularly to teachers and students of the language. It comprises over 40 pages of varied reading matter in the form of anecdotes, verses, fables, stories, commercial correspondence, and scientific and literary articles, written or translated into Esperanto by representatives of some twenty nationalities. Moreover, a more convincing demonstration of the absolutely international character of Esperanto could hardly be found; for here are represented the Esperantists of all the chief European nations, and also of China and Japan, and it should be possible to convince the most hardened sceptic by translating a few paragraphs into English for his benefit. This booklet has clearly come to stay. *Ni tre bone gratulas S-ron Saharov kaj la eldonistojn, kaj esperas, ke aliaj similaj libretoj poste aperos.*—B.E.L.

Gazetoj Ricevitaj.—*Amerika Esperantisto.*

Bulteno de H.C.E. (Septembro kaj Oktobro), organo de la Hokuriku Correspondence and Exchange Club, verkita en la angla, japana kaj Esperanta lingvoj. oficejo: 28, Shinagawa-cho, Kanajawa, Japanujo.

Esperanto (Decembro).—U.E.A. Legindaj artikoloj, "Kant kaj la Eterna Paco," eltiraĵo tradukita de Prof. A. Caumont, el Lausanne; "La Lando de ĉiana Amuzado," de C. W. Ballard, el Melbourne.

Germana Esperantisto (Novembro).—Eldonoj A kaj B.

Kataluna Esperantisto (Oktobro—Novembro), preskaŭ tute dediĉita al raporto pri la VIA. Kongreso de la Kataluna Esp. Federacio, kiu okazis en Vilanova i Geltru en Oktobro, kun multaj ilustraĵoj. Ĝi estis mirinde sukcesa kaj entuziasma, kaj tre bone vidigas, ke nia afero certe ne mortas en Hispanujo.

Monde Esperantiste (Noyembre) enhavas inter aliaj legindajoj simpatian artikoleton nomitan "Brita Kroniko" de nia amiko, Henry van Etten, kaj la daŭrigon de represo de "Kvar Tagoj" de V. Garšin, tradukita en 1896 de N. Kazi-Girej.

Ondo de Esperanto (Novembro) en Esperanto kaj la rusa lingvo.

Esperanto Monthly (Christmas Number).

Holanda Pioniro (Decembro).

Nova Libro.

s. d.

Esperanta Krestomatio el verkoj de 42 diversnaciaj aŭtoroj, ellaboris A. A. SAHAROV o 5

**Logic and Language.**

In the November number of THE BRITISH ESPERANTIST an article by E. L. Jackson ends as follows:—"La pensado estas tute sendependa de lingvo, kiu nur ekzistas kiel ilo por la ĝusta esprimo de la pensoj."

As this conclusion is established beyond all question, it may be useful to note some results which flow from it. We are not infrequently told in linguistic discussions that the use of such and such a word is illogical, but inasmuch as logic deals with the laws of thought and the art of reasoning, it cannot have anything to do with what belongs to language. It is perfectly true that we cannot reason without words or language, and at the one point of notions and names thought and language are closely and inextricably connected, but the moment we leave that point they are separate and distinct. We may liken them to two circles, one slightly smaller inside and touching the other at one point. If nowadays there is anything left of Euclid that we can refer to, such circles cannot touch each other at any other point, though they will follow each other pretty closely.

Let us note the first steps of thought and language from this point of contact. We have on the side of thought fundamental ideas of "things," "qualities," "time," "space," "movement and action," etc., which are represented on the language side by the parts of speech, etc. Each language has a collection of words and sentences representing certain fundamental ideas and the simplest relations between them. This collection is called the grammar of the language. In spite, however, of this manifest simplicity of the nature of grammar, the grammarians of the Middle Ages succeeded in investing it with a mysterious entity, which is indicated by the present-day meaning of "glamour," which is really the same word as grammar, "r" and "l" being interchangeable. In Esperanto only those fundamental ideas and relations which occur in most of the grammars are included, and from this fact, together with the fact that logic itself was evolved by consideration of these fundamental ideas and their simple relations, we may assert that Esperanto is founded on a strictly logical basis. As an illustration of the foregoing we will take the following from the same number of THE BRITISH ESPERANTIST, page 203:—

(1). "Devos sola resti sen propra, logika...nomo. Tia nomo estas 'pundo'."

(2). "Per uzado de la mallogika 'funto'."

Now in regard to the words in question, if Esperantists agree to express the ideas of "pound weight," "pound sterling," "Turkish pound" by the words

"funto," "funto sterlinga (or pundo)," "funto Turka" respectively, it is entirely a matter of language, and logic has nothing to do with it, even though we consider them cumbersome and inconvenient. But if they used the single word "funto" to express the two ideas of "weight" and "money," the rules of logic would apply, for as we find elsewhere on the same page "Estus tute nelogike, se du tute malsamaj aferoj estus signataj per unu sama vorto," as it would lead to confusion of *ideas*.

Let us now hear the conclusion of the whole matter. We should strive always to use the language of logic, but cease to trouble ourselves about the logic of language.

G. WILSON BURN, F.B.E.A.



Alilandaj Sciigoj.

Rusujo.—PETROGRADO.—La Societo "Espero" luis novan loĝojon, kies adreso estas:—Ekaterininskij Kanal, 27, log 8, ĉe Pcelovodstvo"; la kunveno okazas ĉiu-semajne. La 23an de Oktobro okazis la unua en la nuna jaro generala kunveno de la Esperantista Rondeto ĉe l' Universitato, sub la prezido de priv.-doc. S-ro L. V. Šcerba. La rondeto rekomenis sian agadon kaj klopodas pri organizo de kursoj kaj ĉiusemajnaj kunvenoj per referatoj kaj interparoloj. MOSKVO.—La generala kunveno de la loka societo okazis la 11an de Oktobro. La financa raporto montris tre bone kaj la societo nun posedas meblaron kaj bibliotekon valore 1,700 rublojn. Ĉar la antaŭa prezidinto, S-ro R. Mencel, estis mobilizita, S-ro A. A. Safarov estis elektita. TAŠKENT.—S-ro A. Bánoczy, militkaptita oficiro hungara, organizis Esperantan kurson por militkaptitaj oficiroj hungaraj. En ĈITA, militkaptito de Aŭstria Armeo, S-ro Taübman, estinta redaktoro de "La Marto," gvidas kurson por militkaptitoj, partoprenas 12 personoj. Ankaŭ en KOZLOV, TIFILISO, KIEV, BLAGOVEŠČENSK ĉe AMURO, OSTROGOJSK, EKSTERINOSLAV, JURGEVO, ASTRAHAN, IRKUTSK okazis kursoj kaj kunvenoj.

Portugaljo.—En LISBONO en la lasta tempo estas tre vigla propagando de nia lingvo. La kursojn de la grupo gvidos S-roj Rodolfo Horner, Martino d'Almeida kaj Soldanha Carceira. En la Komerca Ateneo, Asocio de Komizoj kaj Libera Universitato okazis bone vizitataj paroladoj kaj kursoj. Interne de multaj elektraj tramoj troviĝas afišoj pri Esperanto.

Japanujo.—TOKIO.—Ĉi tiun someron la Japana Esperantista Asocio laŭ kutimo organizis kurson. Notinde estas, ke unu sinjorino ĝin ĉeestis. En Japanujo tre malofte partoprenas virinoj tiajn publikajn kursojn.

La Asocio aranĝas propagandajn paroladojn.

"Laŭsistemo Lernolibro de Esp." eldonita de Esp. Librejo "Roksej-ša" estas plejparte elvendita. En tio oni povas facile vidi, kiel avide postulas japanoj la internacian lingvon. Ĉiumerkrede TOKIAJ Esp-istoj kunsidas ĉe Scienca Lernejo kaj kafejo Macušita. Sur jurnaloj kaj gazetoj ofte aperas por- kaj priesperantaj artikoloj.

KANAZAWA.—Komencite je la komenco de Julio Esp. kurso por ĉitieaj fervoystoj sub gvidado de S-ro E. Asai, finiĝis je la fino de Aŭgusto. Espereble pere de ili Esperanto disvastiĝos en la Japana fervoja rondo, kie urĝe estas bezonata lingvo internacia.

Ĉi-tiea Esp. Societo vigle funkciis, ĝi aranĝis someran kurson dum du semajnoj de la 17-a de Aŭgusto. La Societo eldonis tre malkarajn sed praktikajn lernolibretojn titolitajn "Unua Lernolibro de Esperanto por Japanoj."

JOKOSKA.—La funkciado de ĉi tiu Societo estas ĉiam vigla. Dank'al S-ro Ossaka Esp. kursoj estas regule malfermataj.

HIROSHIMA.—Sur ĉi-tiea tagjurnalo "Geibi Ničiniči" aperadas poresperantaj artikoloj verkitaj aŭ tradukitaj de S-ro Takahaši. Laŭ la invito de Rust Mančuria Fervoja kompanio S-ro Takahaši veturnis al Harbino por fari lekciojn esperante pri la fervojoj en Japanujo.

Hispanujo.—La ĉefa okazintajo en la kelkaj lastaj semajnoj estis la VII Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio la 16—18 Oktobro en VILANOVA I GELTRU; okazis samtempe la V-aj Internaciaj Floraj Ludoj. Ambaŭ estis tre sukcesaj, multe vizititaj kaj bone raportitaj en lokaj jurnaloj. La organizintoj de la festo havis la bonan ideon eldoni brošuriforme la versajon "La Sunhorloĝo" de la poeto Laüreata en la Floraj Ludoj—S-ro Josep Grau Casas ankaŭ en la kataluna lingvo kune kun vortareto kaj gramatikaj klarigoj. Rilate al la propagandaj rezultatoj, la raporto en *Kataluna Esperantisto* diras:—

"La preparo de la Kongreso, eldono de propagandiloj, programoj, k.t.p., la paroladoj propagandaj okazintaj en la urbo, ne sukcesis tamen veki la tutan loĝantaron al nia ideo. Ni renkontis neniu baron, sed la medio restis malvarma. Ĉe kelkaj personoj eĉ malfavora.

"Sed, alvenis la unuaj vagonaroj, vidigis ĉiuoke nia verda stelo, plenigis la stratojn la kongresanoj, sciigis la urbo pri ilia nombro, kaj ŝajnis kvazaŭ varmiĝus la indiferenteco kaj degelus la glacio de malfavoro. Kiam la urbo sciis, ke pli ol 300 gekongresanoj (*sen ia trograndigo*) el ĉiuj partoj de Katalunujo, kaj eĉ alilandaj, estis veturnintaj al Vilanova, oni komprenis, ke movado, kies celo ne estas la akiro de tuja materia profito, kondukanta al unu loko tiom da personoj, estas grava movado. Kaj ĉio estis al ni proponita kaj ĉiuj facilajoj estis al ni donitaj.

"Oni ekvidis la Ekspozicion, oni sciis pri la ĉeesto de oficiala delegito de la Ministro de Instruado, oni ĉeestis la Florajn Ludojn, kie la sonoreco de nia lingvo konvinkis eĉ la plej skeptikajn, kaj la urbo estis jam gajnita al nia afero. La gazetoj publikigis vastajn raportojn, konataj personoj publike esprimis sian simpaton al nia ideo, multaj konfesis sian eraran antaŭjugon, kaj la organizintoj de la Kongreso, kiuj iafoge devis vole-nevole toleri neplaĉajn aludojn, ricevis la generalajn gratulojn.

"Jen la efiko de la Kongresoj: ĉu la almilito de unu urbo ĉiujare estus ebla sen la sindona kunagado ĉies, sen la kunigo de la individuaj fortoj? Per niaj kunvenoj ni preparas la kampon; per niaj entuziasmo kaj kuraĝo ni pretigas la semojn. Ĉi tiuj ĉi povus neflori, se ĉie oni profunde ellaborus la teron, kiel ĉe la urboj atestintaj pri nia forto? Goju ni, katalunaj samideanoj! Goju ni, ke, se ĝis nun nur en Katalunujo okazis similaj festoj, de post hodiaŭ per la kunigo de la ĉies fortoj en la Konfederacio, kiun ni jus starigis, ni povos helpi la almiliton de aliaj urboj, kie ankoraŭ la sankta lukto por nia idealo ne povis venki la muregojn de indiferenteco.

"Goju ni! Goju...kaj laboru! Vivu la helpa lingvo!"

Almenaŭ en Katalunujo neniel mortis nia lingvo!

Brazila Telegrafo kaj Esperanto.—*Regularo de la Nacia Telegrafo aprobita de la Dekreto No. 11520 de la 10a de Marto de 1915. Artikolo 82, Paragrafo 1a.*—

"Lingvoj klara estas tiu, kiu prezentas kompreneblan sencon en unu aŭ kelkaj el la sekvantaj lingvoj: portugala, franca, angla, germana, hispana, itala, holanda, latina, kaj Esperanto, povante esti postulata de la ekspedanto, sen supertakso, la deklaro, sur aŭtografo, de la lingvo en kiu estas redaktita la telegramo."—El *Brazila Esperantisto*.

La Eklezia Esperantista Ligo.

La Ĉiujara Ĝenerala Kunveno de la E.E.L. okazis en Liverpool, la 22an de Novembro, 1915, sub la prezidanteco de Pastro A. L. Curry, M.A., F.B.E.A., Parohestro de Allerton Bywater (Yorkshire). Spite la malfavoraj cirkonstancoj de la pasinta jaro, la Ĝenerala Raporto de la sekretarioj kiel ankaŭ la Kalkulraporto de la honora kasisto montris plibonigan aferstaton. D-ro A. C. Downer, Parohestro de Selham (Sussex), kaj Pastro C. J. Senior, M.A., Parohestro de Lillingstone Lovell (Buckingham), raportis respektive pro la Sub-Komitatoj de la Ligo laborantaj por la enkonduko de la Lingvo Internacia en Reunuigān (Eklezia) kaj misiajn agadkampojn. Kiel oni antaŭvidis, la terura mond-milito multe malhelpis progresadon ĉiurilate; tamen la sub-komitatoj povas projekti kaj prepari por pli efika laboro post la deziregata reveno de la paco. Mallonga Ordo de Privata Preĝo kunmetita de Pastro A. L. Curry, estis prezentata al la ligkunveno: ĉi tiu oni aprobis kaj ordonis, ke ĝi estu publikigita. La raporto de la sub-komitato, kiu estis laborinta dum la lastaj kelkaj monatoj je la traduko de la libro de Komuna Preĝo de la Eklezio Anglikana estis legata; kaj ankaŭ pres'aŭ kompleta tradukaĵo de la libro en la Lingvo Internacia estis antaŭmetata antaŭ la kunveno de Pastro C. J. Senior pro la Traduka Sub-Komitato. Samtempe la sekretario sciigis la membrojn, ke la pligranda parto de la kosto de publikigo estas garantiita de ligmemtroj. La kunveno tutkore dankis la sub-komitaton por la verko kaj por ĉiuj iliaj klopodoj. Estis decidite, tamen, ke kelkaj malpligrandaj partoj de la libro, kiuj laŭ la originala tradukplano estis eliasotaj, devus esti enmetataj por havigi al Esperantistoj de ĉiuj aliaj nacioj plikompletan tradukaĵon de la Anglikana Preĝlibro. Plie, cedante al la forte esprimita deziro de la Skotaj Esperantistoj, la kunveno ordonis, ke la Ordo de Sankta Komunio, laŭ la uzado de la Episkopa Eklezio de Skotlando, estu tradukata kaj enmetata kiel aldonajo ĉe la fino. Tial ke ĉi tiuj sangoj kaj plivastigoj de la originala plano prokrastos la publikigon de la tuta verko, la kunveno decidis, ke la Ordoj por Matena kaj Vespera Preĝo, la Litanio, kaj la (Anglikana) Ordo de Sankta Komunio devas esti tuj eldonataj plifruie ol la kompleta verko. La sekretario kaj Sinjoro Frank H. Lockyer (el Liverpool) entreprenis organizi sub-komitaton por recenzo kaj eldonado. Se oni deziras plidetales sciigon pri la Ligo aŭ la traduko de la Preĝlibro, oni skribu al Pastro A. J. Ashley, the Vicarage, Farnley Tyas, Huddersfield, Anglujo.



Mia Vizito al la Armeo en Francujo.

De HARRISON HILL.

Dum du semajnoj, Julio 26 ĝis Aŭgusto 7, estis mia privilegio, kiel membro de la koncert-artistaro de Miss Lena Ashwell, fama brita aktorino, viziti nian armeon en Francujo, kaj mi esperas regui tiun honoron dum unu monato de mez-Decembro ĝis mez-Januaro. Do, espereble, mi pasigos Kristnaskon kaj Novjaron meze de la Armeo.

Sendube interesos la samideanojn, sciigi, ke ĉiuj miaj tri filoj estas soldatoj. Jen iliaj nomoj:—Lance-Sergeant William Hill, R.A.M.C., Private Arthur Rowland Hill, Private Charles Henry Hill.

La unue nomita servas en Francujo jam de Decembro, 1914. Mi esperas resti kelkajn tagojn en la regiono, kie li servas. La due nomita travisis gravajn danĝerojn, lia plej apuda kamarado estas mortigita dum

The Church Esperantist League.

The annual general meeting of the above-named league was held in Liverpool on Monday, under the presidency of the Rev. A. L. Curry, M.A., vicar of Allerton Bywater (Ripon Diocese). In spite of the adverse conditions of the past year, both the general report of the secretaries and the treasurer's statement showed that an advance had been made. Dr. A. C. Downer, rector of Selham, Sussex, and the Rev. C. J. Senior, M.A., vicar of Lillingstone Lovell, Bucks, reported respectively on behalf of the sub-committee's working for the introduction of the international language into mission and *réunion* work. A brief form of private devotions in Esperanto for daily use, compiled by the Rev. A. L. Curry, was submitted to the meeting; this met with approval, and arrangements were made for printing it. The report of the sub-committee which had been at work during the past few months on the translation of the Book of Common Prayer into Esperanto was read, and an almost complete version of the Book in the International Language was presented by the Rev. C. J. Senior on behalf of the sub-committee of translators. At the same time it was announced that the greater part of the cost of publication had been guaranteed by various members of the society. The sub-committee was heartily thanked for the work accomplished, but the meeting decided that certain minor parts of the Book, which, according to the original plan of translation, were to have been omitted, should be included, in order that a practically complete version of the English Prayer Book should be made available to Esperantists of all other nations. Also, in deference to the strong wish expressed by the Scottish Esperantists, it was decided that the communion office of the Episcopal Church of Scotland should be translated and printed as an addendum. In view of the delay in publication that these extensions in the plans would entail, it was ordered by the meeting that the order of morning and evening prayer, the Litany, and the communion office should be published at once in advance of the complete work. The formation of a sub-committee for the work of revision and publication was entrusted to the secretary and to Mr. Frank H. Lockyer, of Liverpool. Further information as to the league and its work may be obtained from the corresponding secretary of the C.E.L., the Rev. A. J. Ashley, vicar of Farnley Tyas, Huddersfield.

la batalo de Septembro. La trie nomita ankaŭ preparadas kiel ano de tiu grandega armeo, kiun nun Granda Britujo posedas.

Kiam mi estis en Francujo dum Julio—Aŭgusto mi ĝoje renkontis Sinjoron Harald Clegg, kiu faras tre bonan servon kiel aŭtomobilisto.

Li afable aŭtomobilis nun dum tri-kvar tagoj kaj trovigis en tute bona sanstato. Ankaŭ mi renkontis kelkajn aliajn konatajn Esperantistojn. Ĉiuj sendis salutojn al la samideanoj.

Mi aldonas, ke mi antaŭ-vidas la plezuron re-renkonti niajn samideanojn el ĉiuj lando post la milito. Restante fervore lojala al nia kara Britujo, mi restas ankaŭ—komprenble—ĉe pli ol antaŭe—fervora Esperantisto.

CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address: 17, Hart-street, London, W.C.

COMING EVENTS.

Esperanta Diservo okazos dimancon, Januaro 9an, en Harecourt Church, St. Paul's-road, Canonbury, N., je 3.15, kiam parolos S-ro P. J. Morris, kaj solkantos F-ino Ethel Fitch.—M.C.B.

Saturday, 8th January, an Esperantists' visit to the British Museum will take place.

An official guide will conduct the party from 2 till 3 p.m.

The first party will meet in the Main Entrance Hall at 1.45 p.m., and will commence the tour of the museum at 2, under the official guide, returning to the Main Entrance Hall at 3. A new party will then be formed.

At 4 p.m. the party will adjourn for tea, and afterwards an informal meeting will be held in the B.E.A. Reading Room.

As some matters of great importance to London Esperantists will be discussed at this meeting, it is hoped that every group will be well represented.

If possible, please attend the first party at 1.45, but if this is not possible, come at 3 p.m.

Any further particulars will gladly be given by the organiser, Mr. C. H. EDMONDS, 73, Sydney-road, Hornsey, London, N.

Federacio de Lancashire kaj Cheshire.—La 32a kvaronjara konferenco okazos en la urbdomo, Eccles, sabaton, la 15an de Januaro. La urbestro bonvenigos la federacianojn je la 3.30, kaj poste oni diskutos la jenajn rekomendojn de la komitato:—

1. La grupoj aranĝu reciprokajn vizitojn al la proksime najbaraj grupoj de tempo al tempo, ju pli ofte des pli bone.

2. Ĉiu grupo delegu unu reprezentanton kiu raportos ĉe la somera konferenco de la Federacio pri tiuj vizitoj kaj iliaj rezultoj.

3. Estonte, oni aranĝu specialan sidlokon por la Federacio en iu urbo elektata ĉe la ĉiu jara konferenco. Ĉiuj oficistoj de l' Federacio krom la prezidanto, estu la loka oficistaro de la grupo elektita kiel sidloko.

4. Ĉiu federacia grupo tuj aranĝu specialan kunvenon por diskuti la propagandan agadon de la Federacio en la du graflandoj kaj sendi raporton al la ĝia sekretario.

Oni temanĝos en la Conservative Club, Merton-road, je la 5.30. Koncerto, k.t.p., je la 7a; biletos, 1s. 6d. Partoprenontoj sciigu F-ino Hogg, 11, Mather-road, Eccles, ne pli malfrue ol la 8an de Januaro.—F.P.

Leeds.—La Ĉiu jara Festo de la Societo okazos en Park Rooms, 4, Park-street, Sabaton, la 15an de Januaro, 1916. Je la 3a p.t.m., Komitata Kunveno de J.E.F.; je la 3a.45 p.t.m., Ĉiu jara Generala Kunveno de la **Jorkseira Esperantista Federacio** (por detaloj oni sin turnu al F-ino Morton, Sek. de la Fed.); la 5a.30 p.t.m., temanĝo; la 7a p.t.m., Amikeca Festo de la Leeds'a Grupo, kantado, dancado, k.t.p. Komedieto: "Gustumu la Pudingon." Prezentado de Unuahelpaj Ekzercoj de Esp. Knaboskoltoj. Bileto, kun temanĝo, 1s. 6d.; post temanĝo, 9d. Ĉiuj anoj de la Federaciaj grupoj korege invitataj.

Al la sekretarioj.—**SPECIALA PETO**, bonvolu sciigi la proksimuman nombron da ĉeestontoj el via grupo almenaŭ *du tagojn antaŭe* al L. BRIGGS, Sek., Leeds'a Grupo, West Lea, Armley.

Midland Federation.—The next Conference will be held in Birmingham on Saturday, January 15, 1916. Full particulars may be obtained from hon. sec. of local group or from F. W. Hipsley, 102, Edwards-road, Erdington, Birmingham. Tickets for tea and concert, 1s. per person. Visitors will receive a hearty welcome.

LONDON.

On Saturday, December 11, a party of eighteen Esperantists paid a visit to the Victoria and Albert Museum, South Kensington. Visitors came from Chatham, Hastings, and all parts of London.

The official guide who conducted us related a number of amusing anecdotes concerning the specimens, besides giving very interesting descriptions.

The time passed all too quickly, and it was with great regret that we heard the closing gong.

We then adjourned for tea, and passed a very enjoyable hour, chatting in Esperanto about the language and the Esperanto movement.

The date of the next visit was fixed for January 8 to the British Museum (see Notice).

London Club.—Meetings are held at St. Bride's Institute, Ludgate Circus, E.C., on Fridays, from 7—9.30 p.m. Programme as follows:—

Januaro 7.—Modelaj lecionoj.

Januaro 14.—Parolado, kun lumbildo: "Palestino," F-ino D. Roche.

Januaro 21.—Juveloj el Antaŭaj Kongresoj. Aranĝota de F-ino Walker kaj Grant.

Januaro 28.—Parolado: "En Francujo kaj Belgujo dum la Milito." S-ro W. W. Mann (antaŭa ĉefredaktoro de BRITISH ESPERANTIST).

Willesden.—By request of the Women's Civil Corps, Willesden Company, a lecture on "Esperanto, and its use in Red Cross Work," was given on December 7 by S-ro B. E. Long, B.A., at the Furness Road Schools, Willesden Junction. There was a good muster of the corps, and the commandant, Dr. Granger Evans, presided. Great interest was shown, and 14 member expressed their desire to attend the course of lessons, which will be started in January. Ladies who are not members of the corps will be admitted to the course on payment of a small fee. Names should be sent in to Miss Blake, 37, Staverton-road, N.W., before January 10.

THE PROVINCES.

Eccles.—The new students are making good progress, and bid fair to increase the teaching staff for next session. We are fortunate in having a real live *sekretariino*, who is *tute nelacigebla*, and her efforts for the success of the Lancashire and Cheshire Federation Conference, to be held at Eccles on January 15 next, are deserving of a record attendance.

Groups please note.—Get a *sekretariino*, but don't *forlogi* ours.

Halifax, Laborista Grupo Esperantista.—At last we have succeeded in organising on a grand scale the above group. The importance of this step will be seen in our affiliation to the Trades and Friendly Societies Club, whose Council is a very important factor in the educational and municipal work of our borough town. Our group, being well represented, will be able to give an impetus to our movement amongst the *potenculoj*.

Established on a sound basis, with the splendid club-premises as a further attraction, we expect to develop rapidly from our nucleus of *spertaj geesperantistoj*. Our club rooms will be open daily, and visitors may rest assured of a hearty welcome. *Estrarano*:—S-ro W. E. Greenwood, *Prezidanto*; S-ro H. H. Paris, *Vice-Prezidanto*; S-ro Duckworth, *Kasisto*; S-ro J. Hoyle, *Sekretario* (pro tem.). *Instruantoj*:—S-roj Duckitt, Greenwood, Hoyle, Paris.

Paignton.—Je la 3ia de Decembro la grupeto ekzistis dum unu jaro. Jen statistiko: kunvenoj okazadis ĉiusemajne krom du, ĉeestantoj estis meznombre 5.5, en 13 vesperoj venis vizitantoj aŭ vizitanto; oni faris kvin ekskursojn; nombro de membroj en la komenco de la jaro estis 8, en la fino estis 11; en la komenco de Novembro oni komencis kurson poi komencantoj, kiuj espereble donos membrojn al ni en la jaro 1916.

Tiu statistiko estus pli kontentiga se la Milito ne forrabus de ni du membrojn, kaj malhelpus la ĉeeston de 3—4 aliaj. Ni propagandis per letero al instruistoj kaj redaktoroj, kaj per disdonado de propagandiloj, k.t.p. Tri membroj ĉeestas la Bathan Kongreson.

La tempon ĉe la kunvenoj ni pasigis ĉefe per legado en lernolibro, per interparolado kaj rakontoj pri travivaĵoj de samideanoj: en la lasta kategorio S-ro. Sweet el Kanado donis al ni interesajn temojn pri sia sperto sur la *Lusitania*, F.-ino Cowper pri sia travivaĵo sur Snowdon, kaj la prezidanto, S-ro Trewin, kun sia "hetmano," C. Beer, pri siaj aventuroj sur la stepo, Dartmoor.

S-ro Jackson adaptis la Gregg stenografion al Esperanto, kaj S-ro Gregg promesis eldoni ĝin.

La sukceso de la unua jaro devenis de la tre ofta ĉeesto de la bonhumora prezidanto kun lia "hetmano."

Ni opinias, ke estus bone se ĉiu brita grupo farus fidindan statistikon pri sia stato.—H.B.H., hon. sek.

Partick.—La grupo havis la honoron akcepti du tri el la gesamideanoj de Greenock, merkredon, la 8an de Decembro. Post la temango la vizitantoj tre aſable faris tion, kion la prezidanto, en sia antaŭparolo, diris, ke oni atendis de ili, nome, ili aldonis la "intelektan feston." Ili kantis, rakontis humorajojn, k.t.p.

La monata Diservo de la grupo okazis la 11an de la monato. La prezidanto, S-ro Thos. Dawson, F.B.E.A., faris la predikon. Li pritraktis, tre interesan kaj inspiran paroladon pri "La preparado por estontaj provtempoj."

Rock Ferry.—On December 14, at St. Paul's Parish Hall, Mr. S. Jackson Coleman delivered an entertaining lecture, "With the Esperanto Flag in many Lands," illustrated with the B.E.A. slides. Mr. Coleman gave a vivid account of the various Congresses, and reminding the audience that it was the eve of Dr. Zamenhof's birthday, they fervently sang, "Li estas bonegulo!" and expressed the hope that peace would soon be re-established and the ideals of Esperantists realised.

Southport.—Kvankam pro la milito, k.t.p., la nombro da ĉeestantoj en la ĉiusemajnaj kunvenoj iom malpligrandiĝis, la grupo daŭras kunveni. La kunvenejo sangiĝis kaj nuntempe je la 8a vespere ĉiun mardon, la anoj kunvenos en la *Temperance Institute, London-street*.

Vizitantoj al Southport, ne forgesu enveni!

La 7an de Decembro, okazis en la Institute, tre sukcesa vistrondo aranĝita de la sekretariino, Sinjorino Pierpoint; ĉeestis ĉirkaŭ 70 personoj, multaj el kiuj estis soldatoj, kaj unu Sergeant Carney bone deklamis, "La Domo kun la Malferm(it)a Pordo," tre drama epizodo de la nuna milito.

Dum la intertempo parolis pri Esperanto F.-ino Iddon, F.B.E.A. Tre lerte ŝi klarigis malmultavorte, la celojn de la lingvo, kaj ni esperas, ke multaj ĉeestintoj sufice interesigos por eklerni la karan lingvon.

Kelkaj ludoj kaj dancoj finigis tre interesan kaj agrablan vesperon.

S.-ino Pierpoint, S.-ino Barnes, kaj S.-ro R. Wright tre aſable donacis premiojn por la vistrondo.—FREDA SMITH.

York.—Ĉie kaj ĉiam en tiu ĉi milita ĉefurbo de la nordo oni trovas memorigilojn pri la Eŭropa katastrofo, sed malgraŭ tio la loka societo progresas kontentige, kaj la entuziasmuloj senĉese penadas "verdsteligi" la urbon antaŭ ol okazos la Kongreso. Sendube, la publika parolado de D-ro Pollen, kiun li espereble faros en York dum Januaro multe helpos al tio.

Kun bedaŭro, sed samtempe kun fiero, ni raportas la perdon de kelkaj el niaj junaj anoj, kiuj soldatiĝis.—W.F.L.

WALES.

Ystalyfera.—Je la 20a de Novembro, Pastro W. H. Harris, B.A., B.Litt., F.B.E.A., faris paroladon pri "Esperanto la Mond-Lingvo" antaŭ la loka I.L.P. La ĉeestantaro kvankam ne multnombra, montris grandan intereson, kaj invitis la pastron veni pliposte por pliklarigi la movadon kaj doni lecionon. "Tiel ni semu kaj semu konstante," "ĉar ĝustatempe ni rikoltos, se ni ne laciĝos."

Estas ankaŭ interese rakonti, ke troviĝas en tiu ĉi urbo Rusino el la Provincoj Baltaj, kiu deĝoras kiel guvernistino, kaj estas fervora kaj lerta Esperantistino. Estis agradable renkonto je tia malproksimilanda samideanino. Tia renkonto (kiu ne staras sola) plifortigas la konvinkon pri Esperanto, ke "tra la tuta mondo iris ĝia sono, kaj ĝis la fino de la tero ĝiaj vortoj."



War-Time Propaganda.

(See Report of Council Meeting, p. 12).

To all Esperantists.—If you have any books in Esperanto or about Esperanto which you no longer need, or if you have any back numbers of foreign Esperanto magazines, you are earnestly requested to forward these to the undersigned in order that they may, be despatched to our soldiers and to prisoners of war in Germany and Austria.

Thousands of propaganda booklets are needed to spread a knowledge of Esperanto among our soldiers both in England and abroad.

Money for postage expenses and for the purchase of books is also badly needed, and donations, however small, will be welcomed.

To Esperantists serving in the Army and Navy.—If you are in a position to dispose of any quantity of propaganda booklets, or if you need reading matter, you are invited to write to the undersigned, who will send books and will put you in touch with Esperantists should you wish to improve your knowledge of the language by correspondence.

Esperantists in the Y.M.C.A. are requested to communicate with a view to propaganda.

To Prisoners of War in Germany and Austria.—Esperanto classes have been started in several internment camps, and the undersigned will be glad to help with the formation of classes by supplying text-books and reading matter.

To Secretaries of Esperanto Groups.—In spite of previous requests the list of Esperantists serving in this war is by no means complete, and *secretaries of groups* would therefore greatly help by supplying further names and latest addresses of members serving.

Individual Esperantists are also invited to send their names and those of their friends who are taking any part in the War.

All communications should be addressed to Mr. C. H. EDMONDS, c/o The Propaganda Committee, B.E.A., 17, Hart Street, W.C.

The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

WM. BANNER, 30, *Barclay-road, Fulham, S.W.*; WM. BEVAN, 1, *Victoria-place, Seacombe, Cheshire*; JOHN BIRTWISTLE 236, *Turton-road, Bradshaw, Bolton*; J. CARLTON, 191, *Hawthorn-avenue, Hull*; C. B. CHAPPELL 207, *Freshfield-road, Brighton*; GEO. DICKINSON, 11, *Jameson-place, Leith*; CHARLES H. EDMONDS, 73, *Sydney-road, Hornsey, London, N.*; THOMPSON GIBSON, 140, *Tarring-road, Worthing*; Miss E. L. HOLDSWORTH, 19, *Welbeck-street, Wakefield*; Mrs. MARY J. HOME, *Slade-road, Newton, Swansea*; G. KIRBY and Mrs. KIRBY, 47, *Hillfield-road, W. Hampstead, London, N.W.*; Mrs. D. E. MAGNESEN, “*The Hawthorns*,” *Elmfield-road, Bromley South, Kent*; F. H. PEACOCK, 93, *Woodcock-street, Hull*; CHRISTOPHER L. POWELL, 62, *Conduit-street, Gloucester*; HAROLD SHORE, 7, *Bansfield-terrace, Burley, Leeds*; Miss B. M. STEPHENS, 11, *St. James-square, Aberystwyth*; ERNEST G. WATSON, 6, *Parliament-hill, Hampstead, London, N.W.*; G. WOODGATE, 21, *De Beauvoir-square, London, N.*

Correction in December List.—JOHN C. AUTY, 121, *High-lane, Sheffield*.

NEW FELLOWS.

Dr. J. BURNET, M.A., M.D., Ch.B., M.R.C.P.E., *Edinburgh*; BERTRAM POTTS, *Wellington, New Zealand*; PESHOTON SORABJI GOOLBAI DUBASH, F.R.S.A., M.N.E.C.I., F.R.M.S., etc., *Highbury New Park, London, N.*



New Members for 1916.

The importance of increasing our Membership at this rather critical time will be apparent to everyone, and a special appeal is made to present MEMBERS to induce their friends to realise the importance of supporting such a Movement as ours. See that they join early in January! THE BRITISH ESPERANTIST will keep them in touch with current events.

ABONANTOJ! Petu prospekton ĉe la Sekretario kaj sciigu pri la utiloj de Membreco.



Subscriptions, 1916.

Fellows and Members are respectfully informed that subscriptions for the year **1916** became due on 1st January, 1916. Those who have not yet remitted are requested to do so as early as possible. The annual subscriptions are:—Fellows, 10s.; Members, 5s.

E. A. ALLSOP, Acting Secretary.



The Examinations Committee begs to announce that on Monday, February 14, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., will be held an *Examination for the Preliminary Certificate*, at 7 p.m., and on Tuesday, February 15, an *Examination for the Advanced Certificate*, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anorcojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilingva empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresacon senpage. *Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.*

644. **Yarrawonga (Victoria) Aŭstralio.**—S-ro L. J. Bowles deziras korespondadi kun geesperantistoj ĉiulandaj kaj interŝangi poŝtmarkojn.

645. **Brighton (Anglujo).**—S-ro Dorlencourt, 14, *York-villas*, deziras interŝangi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn: sendus 14 malsam. anglajn nunttemp. poštmi. (1p. ĝis 7p.) aŭ 15 aŭstr. jubileajn 1908 (1 ĝis 2kr.) aŭ aliajn kontrau simile kunmetita serio.

646. **Harderwijk (Holando).**—Korporalo Louis Labrune, *3eme Chasseurs à pied Baraque, 41*, dezirante perfektiĝi volas korespondadi kun samideanoj el ĉiu lando per letero aŭ ilustritaj poŝtkartoj.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, 20th December, 1915, at 6.30 p.m. Present: Messrs. M. C. Butler, B. Chatterton, C. A. Fairman, G. Mercer Hollis, B. E. Long, S. H. Taylor, Dr. John Pollen, Misses M. L. Blake, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, E. O'Brien. In Attendance: Messrs. E. A. Millidge and E. Coram.

Chairman.—Dr. John Pollen was elected Chairman of the Meeting.

Propaganda amongst Interned Soldiers and Civilians.—Miss Blake brought up the question of forming a Special Committee to deal with propaganda among interned soldiers and civilians. Mr. Edmonds was invited to speak further on the subject, and after the scheme had been fully explained it was resolved

“That the Propaganda Committee should establish a special fund to send propaganda literature to our soldiers' camps and to British and Allied prisoners of War, and that Mr. Edmonds be co-opted a member of the Sub-Committee to work with the Secretary for this purpose, an appeal for aid being published in the B.E.”

Voluntary Assistance at B.E.A. Office.—It was resolved that a vote of thanks be accorded by Council to Mr. Fairman, Mr. Robertson, Miss Purvis, Mr. Edmonds, Mr. Butler, and Miss Allsop for the kind assistance they have so readily rendered in conducting the work of the Office in the present emergencies.

Mr. Butler announced that an Esperanto translation of *Quaker Strongholds* was in the Press, and received the authority of the Council to print the name of the B.E.A. on the title page as publishers for the translator, or as agents for Messrs. Headley Bros., should they publish it.

It was decided that the Offices should be closed from the 25th till 28th December inclusive.

Nomination of Councillors, 1916-17.

The Members and Fellows of the Association are reminded that they have the right to nominate candidates for election as Officers and Council for the ensuing year.

Members and Fellows who desire to avail themselves of this privilege may obtain Forms of Nomination, with the necessary Instructions, from the Secretary of the Association.

The latest date for the receipt of nominations is 17th January, 1916.

Council and Executive Meetings, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, January 17, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m., and the following meeting on Monday, February 21, at the same place and time.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

AGENDA.

Financial Statement.

Correspondence and other Business.

E. A. ALLSOP, Acting Secretary.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anorcojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilingva empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio).

647. **Harderwijk (Holando).**—Korporalo Hubert Saive, *3me Chas-à-pieds, interné au camp, baraque 41*, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj.

648. **Rouen (Francujo).**—Al britaj samideanoj en Rouen kaj ĉirkaŭajoj. S-ro Ad. Panlon, *Rue Arthur Durval, Sotterville-lès-Rouen*, deziras interkomunikigi kun britaj amikoj.

649. **New Zealand (Aŭstralio).**—S-ro Charles Chapman Taylor sciigas novan adreson: *Fredericks-road, Hastings, N.Z.*

650. **N. Queensland (Aŭstralio).**—S-ro Charles Price, *Empire Hotel, Allen-st. South, Townsville*, deziras korespondi precipe por helpi lernantojn.